

ESPERANTA MORSA KODO

HENRI Y. CHAISNOT
Francujo

C. JAMES McMULLEN
Britujo

DAVID B. RICHARDSON
Usono

ESPERANTA MORSA KODO

GRAVA NOTO

La kodo, per kiu finiĝas la sekvanta raporto, estas provizore agnoskita de U.E.A. por uzado de Esperantistoj Atentu, tamen, ke ĝi ne estas akceptita de la Telegrafaj Reguloj, kaj do oni ne rajtas ĝenerale dissendi ĝin per radio, sed oni ja rajtas signali per lumo aŭ privata fermcirkvita sistemo (ekzemple zumilo), uzante la kodon. Estas memorinde, ke la dissendo de *h* anstataŭ cirkumflekso kaj *u* anstataŭ *ŭ* estas ĉiam permesita kaj ankaŭ ĉiam komprenebla. La kodo restas provizora ĝis 1965a jaro, kiam U.E.A. konsideros plenan agnoskon.

En Usono, la registara telekomunika instanco F.C.C. jam agnoskis la novajn morskajn signojn, kaj donis sian permeson al usonaj amatoroj uzi ilin, "kondiĉe ke ĉiuj amatoroj sendante en Esperanto per radiotelegrafo uzu la samajn signojn." Usonaj amatoroj do nepre ĉiam uzu la novajn signojn por esperantaj sendoj, kaj alilandaj amatoroj citu tiun precedencan decidon de F.C.C. petante similan permeson ĉe la respektivaj landaj instancoj.

HISTORIO

La problemo pri la morskaj signoj, kiujn la ses sole Esperantaj literoj bezonas, interesas tiujn, kiuj uzas kaj la Internacian Lingvon kaj la Morsan Kodon, jam longe. Kelkaj privataj planoj produktiĝis dum la lastaj jardekoj, sed neniu ĝuis sufiĉon da disvastiĝo por nomiĝi "La Esperanta Morskodo". En Majo 1961a aperis en la revuo "Esperanto" letero de unu el la subskribintoj de ĉi tiu deklaro, Sinjoro McMullen, kiu petis informon, ĉu ekzistas, oficiala aŭ duone oficiala kodo. De la rezultinta korespondado, li verkis raporton, kiu aperis en la Revuo

februare 1962. Tiu raporto, kiu enhavis ĉe la fino kodon proponitan de la aŭtoro, pere de la sugestoj de la entuziasmaj korespondintoj, kaŭzis siajn proprajn korespondadon kaj proponojn. Tial oni decidis starigi trihoman poŝtan Komitaton neoficialan, kvankam en konsultaj rilatoj kun estrarano de la Universala Esperanto-Asocio, por diskuti kaj fine fari decidon pri ĉi tiu temo. Tiu Komitato konsistas el la tri ĉi-tieaj subskribintoj.

LA LEGO

La Telegrafaj Reguloj (Genevo 1958) zorgas pri la sendado de telegramoj kaj pri ĉia radiofonia signalo, ĉu de amatoraj aŭ komercaj stacioj. La Reguloj permesas la uzon de la dudek ses bazaj literoj (a ĝis z, inkluzive de q, w, x kaj y) kaj la supersignita 'e'. Por trafiko inter certaj landoj, diversaj supersignitaj literoj estas ankaŭ permesitaj, kaj morsaĵ simboloj estas provizitaj, sed oni rajtas uzi tiujn, nur se kaj la dissendanta kaj la ricevanta landoj allasas tion. Tiuj literoj estas ä, æ, á, â, ñ, õ, ø kaj ŭ kaj la literparo 'ch'.

Esperanto estas permesita por klarlingva telegrafa korespondo ekde 1925, sed nenia regulo estas farita por la supersignitaj literoj. Do, bedaŭrinde, la kodon deciditan ĉi-sube de la Komitato, oni ne rajtos dissendi per radio aŭ uzi en telegramoj ĝis la Unuiĝintaj Nacioj aŭ iu fako de la Internacia Telekomunikada Unio proponos ŝanĝojn al la Regularo. Tamen oni ne ofendos la leĝojn per dissendo de 'h' anstataŭ cirkumflekso kaj 'u' anstataŭ 'ŭ', aŭ de tio, kion rekomendis por sciencaj presaĵoj la Unua Konferenco pri Lingvaj Problemoj en Scienco, nome 'x' anstataŭ cirkumflekso kaj 'w' anstataŭ 'ŭ'. La Komitato konsilas, ke oni uzu tiun unuan rimedon (la h-metodon) kiam ekzistas dubo pri la leĝo, aŭ kiam oni ne estas certa, ĉu ĉiu komunikanto komprenas la novan kodon. La dissendo de la decidita simbolo por 'ŭ' estus permesita en iuj landoj, ĉar ĝi estas ankaŭ la simbolo de 'u' unu el la supre menciitaj duone agnoskitaj literoj. Signaladon per lumo, sono aŭ privata fermcirkvita sistemo (ekzemple zumilo), la leĝo ne tuŝas, kaj tial oni rajtos uzi la Espe-

rantan Morskodon per ĉi tiuj metodoj.

Estas esperate, ke baldaŭ Esperanto iĝos sufiĉe vaste parolata, por ke U.E.A. povu proponi al la I.T.U. aŭ U.N. oficialigi leĝe la Kodon, kiu estos jam oficialigita de la Asocio mem.

BEZONO

Ne la malplej grava kialo por la bezono de Esperanta Morskodo estas la longeco de du apartaj simboloj kompare kun unu sola (ekzemple 'c-h' kompare kun 'ĉ'). La meza longeco de la kvin literoj, al kiuj oni eble aldonus 'h'-n, estas 9 baŭdoj (kie unu baŭdo estas la longeco de unu punkto [.], dum tiu de la kvin paroj kun 'h' (c-h, g-h k.t.p.) estas 19 baŭdoj.

Cetere, malgraŭ la Zamenhofa permeso al presejoj ne plene ekipitaj anstataŭigi la cirkumflekson per 'h', Zamenhof mem uzis la sistemon nur en telegramoj, kaj cetere supersignitaj literoj en Esperanto estas pli apartaj kaj sendependaj de siaj bazaj literoj ol en aliaj lingvoj. Tiuj estas argumentoj por la konstruo de apartaj kaj sendependaj morssimboloj. Alia argumento estas, ke la simpla ekzisto de tiaj simboloj, aŭ la fakto, ke ni povos diri, ke kompreneble ekzistas Esperanta Morskodo, kvankam oni eble malofte uzos ĝin ĝis post jardekoj, pli-malpli helpas la propagandon, ke Esperanto estas uzata kaj memstara lingvo.

Tamen, la komitato konstatas, ke la uzado de la supre menciita 'h'-anstataŭigo estas ofte deviga pro leĝo aŭ oportuneco.

LA ELEKTO DE SIMBOLOJ

La nesribitaj principoj, kiuj gvidis la komitaton, estis mallongeco, facileco de lernado, taŭgeco por la malkonfuzo de la aŭskultanto aŭ rigardanto, kaj la logeco por la esperinda leĝoŝanĝo. Pro la lastaj tri gvidiloj, la Komitato decidis, ke restu neŝanĝitaj la dudek du komunaj kaj la kvar fremdaj sensupersignitaj literoj, kaj ke la parte agnoskitaj simboloj por la supersignitaj 'a'-oj, 'e', 'n' kaj 'o'-oj ne uziĝu por niaj ses novaj literoj. Por ke la Kodo estu facila al la lernanto, en la kazo de la

supersignitaj literoj, la Komitato aldonis, ĝenerale iaŭskeme, simbolerojn al la bazliteraj simboloj. La skemo estas aldoni unu punkton (.) al kvarpartaj simboloj aŭ "streko-punkton" (-.) al tripartaj. Nur ĉe 'ĥ' kaj 'ŭ' necesis malobei la skemon, kaj tiam nur etc. Per tio fariĝis simboloj, kiuj taŭgas ne nur pro lernebleco, sed ankaŭ pro ne troa longeco, kaj en tri kazoj sameco al simboloj uzataj aŭ iam uzitaj por la samaj literoj alie supersignitaj. Tiu lasta eco inter alie helpas persvadi la legajn agnoskontojn, ke la Kodo ne estas tro radikala aŭ arbitra.

Laŭ individuaj literoj. Ĉ: Per apliko de la skemo al 'c' (-.-.), fariĝas neoficiala simbolo (-.-.) iam uzita por la franca kaj portugala 'ç'. Ĝ: Per apliko de la skemo al 'g' (-.-.), aperas la serbo-kroata 'g' (đž) (-.-.-.). H: Post longa debato, la Komitato decidis apliki la skemo al 'k' (-.-) anstataŭ al (h) (....) por fari ĉi tiun literon (-.-.-.). Se oni aldonus punkton (.) al 'h', aperus '5' (...); se strekon (-), aperus '4' (...-); se streko-punkton (-.) aperus sesparta simbolo (...-.), kaj sespartajn simbolojn oni uzas nur por interpunkcio. La nelaŭskema asigno de la parte permesita 'ch' (----) estas diskutita, sed oni decidis, ke pro la malsamaj roloj de ĉi tiu literparo en diversaj lingvoj, la asigno konfuzus. Ke la nova simbolo por 'ĥ' nun koincidas kun amatora proceda signo (signifanta "al vi, la nomita stacio; ĉiuj aliaj atendu") ne ĝenas, ĉar oni notas, ke 'k' kaj 'r' estas ankaŭ procediloj, kiuj respektive signifas "al vi" kaj "ricevita"; ĉu ĉi tio ja faciligos leĝoŝanĝon, oni ne profetis. J: Apliko de la skemo al 'j' (.---) donas taŭgan simbolon (.---.). S: Per apliko de la skemo al 's' (...), fariĝas la simbolo (...-); ĉi tiu ankaŭ estas proceda signo, signifanta "komprenita". Ŭ: La aldono de streko, anstataŭ streko-punkto, al 'u' (...-) donas la parte permesitan 'ü' (...-), kaj oni decidis, ke ĉi tia malgranda malobeo de la skemo estas akceptebla pro la avantaĝoj de la koincido kun 'ü'.

La Komitato decidis, ke ĝi ne tuŝu interpunkcion aŭ procedilojn, kvankam malsamaj fakoj uzas malsamajn sistemojn ĉi-rilate.

LA KODO

La Kodo, kiun la Komitato decidis kiel "La Esperanta Morskodo", kaj kiu estas ĉiam anstataŭigebla per la kutima internacia kodo uzanta c-h, g-h, h-h, j-h, s-h kaj u, anstataŭ ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj ŭ respektive, estas jene:

A	..	G	---	K	---	S	...
B	G	----	L	S
C	H	M	--	T	-
C	H	----	N	-	U	..
D	..	I	..	O	---	U
E	.	J	----	P	V
F	J	----	R	..	Z

La fremdaj literoj ä, æ, á, â, é, ñ, q, ö, ø, ü, w, x kaj y restas senŝanĝaj, kie tiuj estas akceptitaj kaj komprenataj.

La numeraloj restas senŝanĝaj.

La interpunkciajn kaj procedajn signojn oni daŭre uzos laŭ la kutima uzado de la propra signala sistemo.

Subskribas:

Sinjoro Henri Y. Chaisnot,
5, rue Pasteur, Fleury-les-Aubrais,
Loiret, Francujo.

Radiisto (amatora voksigno F9ED)

Subleŭtenanto C. James McMullen,
R.N. Meadow Spring, Walhampton,
Lymington, Hampshire, Anglujo.

Maroficiro

Sinjoro David B. Richardson,
RFD Box 81, Eastsound
Washington, Usono.

Televida inĝeniero; radioamatoro
(voksigno W7LLV)